

## REDAKTORA VORTO



★

Kara leganto,  
ĉu vi rimarkis la strangajon,  
ke preskaŭ ĉiu esperantisto estas sola  
samideano en sia medio  
(oficejo, produktejo, organizaĵo, ktp.)?  
Jen tra tuta nia lando ekzistas  
nur unu juristo (esperantisto), nur unu  
lingvosciencisto, nur unu kuracisto,  
nur unu financisto.  
Escepton faras instruistoj, sed maloftaj  
esceptoj ja konfirmas la regulon  
(ankaŭ ili estas solaj esperantistoj  
en siaj lernejoj).  
Estas impresoj, ke neniu el ni en sia medio  
estas imitinda ekzemplo por aliaj.  
Pripensu do, kial vi estas solulo,  
kial neniu el via medio revas fariĝi  
uzanto de Esperanto.  
Ne malofte esperantistoj ĝenas malkaŝi  
al eksteruloj sian esperantistecon,  
Ili eĉ anstataŭ la nomo "ESPERANTO"  
uzas nur la LINGVO INTERNACIA.  
Apenaŭ tio estas ruzaĵo.  
Estas domaĝe, ke la aspiron de Zamenhof  
fari Esperanton lingvo internacia  
uzurpis la angla. Ne pensu, ke ĉiam kaj  
ĉion devus decidi kvalito, sed ne kvanto.  
Kunesti devas ambaŭ:  
la kvaliton de lingvo Esperanto devas  
apogi kvanto de videblaj ĝiaj uzantoj.  
Ĉu vi kredas, ke eblas ĉion ŝanĝi al pli  
bona situacio? De kio komenci?  
Eble de la malkaŝo, ke  
vi estas esperantisto.

★

Vytautas Šilas /*Vi:taŭtas Ŝilas*

# LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 3 (193)

majo - junio 2010, XX jaro

## ENHAVO

- 2 Kien ni iras la HOMAR`
- 5 Fotoartisto lirikulo  
R. DICHAVIČIUS
- 11 Zamenhofaj ideoj
- 13 Jubileo de interlingvisto  
A. GUDAVIČIUS
- 15 *Juneco* festenas pri arkitekto  
K. TAMOŠĖTIS
- 16 Utila kaj agrabla renkontiĝo
- 17 Pri Akademio de Esperanto
- 19 E-Vikipedio antaŭenmarŝas
- 20 *Centro Zamenhof* en Bjalistoko
- 22 Litovio por Kartvelio
- 23 Nova prezidanto de LRT  
D. RADZEVIČIUS
- 25 Ĉielarko super Vilno
- 28 Aldono al Universala Vortaro
- 29 *Venos mi* - kanto
- 30 E-mozaiko
- 31 Ridetu kune
- 32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj sur kovrilaj paĝoj –

sur la 1a – de Stasys PAŠKEVIČIUS  
sur la 3a – de Rimantas DICHAVIČIUS  
sur la 4a – de Rimantas DICHAVIČIUS

## KIEN IRAS LA HOMAR` ?

Ĉu la homaro kreas humanan socion? Neniu restis indiferenta al la proponita neordinara pordiskuta temo de ĉi-jara ĵurnalista seminario. Esperantistoj-ĵurnalistoj, membroj kaj gastoj de LEĴA (Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio) la 8-an kaj 9-an de majo kolektiĝis al la tradicia, jam tria, tendaro-seminario. Ĉi-foje la loko por la seminario estis elektita en urbeto Aukštadvaris, fama per antikvaj popolaj legendoj, eminentaj historiaj kaj naturaj lokoj. Estis turisma bieneto de geedzoj Bielinis. Situanta ĉe belega lago, ĝi gasteme akceptis esperantistojn. Oportunaj unu-du litaj ĉambroj, komuna salono, bona kuirejo, ankaŭ surkorta somera ombroŝirmejo, fajrejo kaj apud la lago aparte staranta banejo, boatoj por nia dispono. Aldonu ankoraŭ freŝverdajn kaj vastajn herboterenojn kaj belajn sunajn tagojn... "Kial do ne preskaŭ surtera edeno!!" - diris iuj poste.

Tradicia Amika Rondo apud la Verda standardo. Kolektiĝis pli ol 20 homoj. Post la solena malfermo, kiun komencis la prezidanto de LEĴA kaj samtempe la prezidanto de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) Audrys Antanaitis, sekvis prezento de la plej gravaj agoj dum la pasinta jaro. A. Antanaitis memorigis, ke ĉe Litova Ĵurnalista Asocio (LĴA) li fondis kaj ekgvidis E-klubon. Poste tuj okazis elekto de nova estraro de LEĴA. Ĝi nun konsistas el 5 personoj: prezidanto - Vytautas Ŝilas, membroj: Julija Antanaitienė, Regina Dovidavičiūtė, Algimantas Piliponis, Kazys Svidenis.



*Delive sidas R. Dovidavičiūtė, J. Antanaitienė, staras V. Ŝilas, K. Svidenis, A. Piliponis*  
 Por la solena tagmanĝo – la rostrita surfajre viando-*ŝaŝlikoj*, hejme bakita kuko kaj abunda ĉampano transformis la seminarion je festo, des pli ke surmonte la sonorilo de preĝejo laŭte anoncis: komenciĝas la meso, dediĉita al Sankta Stanislavo! Oni ĝoje

gratulis min, ja mi estas Stanislava (denaska esperantistino, filino de elstara esperantisto Ludomir Sobanski, forpasinta antaŭ tri jaroj). Per herbejflora krono estis gratulita ankaŭ Vida Ĉojiene festinta sian naskiĝtagon!

Post la tagmanĝo ĉiuj dividiĝis je du grupoj. Komencantoj foriris kaj mi ilin “okupis”, gvidante la kurseton je propra maniero, kun uzo de gajaj pupoj.



Spertuloj restis surloke por esperantlingva diskuto. La diskuton gvidis Kazys Svidenis, kiu proponis la temon “Ĉu homaro kreas humanan socion?”. Enkonduke li prezentis tutmonde faman profesoron doktoron pri psikologiaj sciencoj, vojaĝanton, Frank David Cardelle kaj ties litovlingve eldonitan libron *Pasaulio siela* (Spirito de la mondo). La aŭtoro, naskiĝinta en Usono, duonindiano, laboris en 40 kaj vizitis ankoraŭ 60 landojn. Lastatempe li agis plejparte en Ĉinio, Rusio kaj ankaŭ en Litovio. Antaŭ du monatoj la aŭtoro mem partoprenis en prezentado de sia libro. K. Svidenis havis eblecon persone kumunikiĝi kun li. Bedaŭrinde jam en aprilo, li post longa



batalo kontraŭ kancermalsano forpasis. Jen kelkaj pensigaj faktoj el lia libro:

– Post la dua mondmilito en la mondo okazis pli ol 250 pli aŭ malpli grandaj militoj, dum kiuj pereis 23 milionoj da homoj.

– Dum lastaj 90 jaroj pereis trifoje pli da homoj ol dum la antaŭpasintaj 500 jaroj.– Dum la nunaj 20-50 jaroj surtere malaperos ĉirkaŭ 10% da plantoj kaj bestoj.

Kiom do pacienci povas nia TERO?!

Plejparto de la diskutantoj esprimis sian maltrankviliĝon pri la estonteco. V. Ŝilas rezonis pri la realeco de interkonsento inter sciencistoj kaj registaroj. Ĉio komencos pliboniĝi, kiam oni ekaŭdos unu la alian. Aliaj diskutantoj estis malpli optimismaj. La aŭtoro de la libro atentigas: Multo dependas de ni ĉiuj. La tempo urĝas!

Post la E-kurso kaj la diskutado Esperanta standarto kunvokis ĉiujn por la komuna fotado. Nin jam atendis varma banejo kaj sekvis komuna aplaŭdado al kuraĝuloj, kiuj elprovis la unuan ĉi-jare naĝadon en la freŝiga lago.

En ombroŝirmejo tra mirinda printempa vilaĝa silento eksonis E-kanto – ĝis malfrua nokto. Gitarkantado de V. Ŝilas memorigis historian tempon de E-movado, kaj milda revema voĉo de V. Ĉojiene transigis ĉiujn al romantika kunesto. Je antikva litova popola maniero solkantis A. Antanajtis, A. Piliponis mirigis nin pri anglodevenaj kantoj. Venis nokto, ĉe la tablo restis nur la plej fidelaj al kunestado ...



La plej grava aranĝo de la dua tago estis renkontiĝo kun reprezentantoj de la urba komunumo. Venis du aktivaj virinoj, respondecaj pri multaj lastjaraj agprojektoj. Estis sindiko de *Aukštadvaris* Janina Staldaunykienė kaj prezidento de loka komunumo Regina Budrevičienė. Ili favore akceptis la ideon kunlabori kun esperantistoj, proponis interesi pri Esperanto la lokan loĝantaron. A. Piliponis proponis sin por esti gvidanto de ĉi tiu projekto. S. Sobanska konsentis veni kaj gvidi E-kurson. Ni por la socio proponas kunlaboron! Do, ĝis la revido *Aukštadvaris* !!

P.S. La Amika rondo kunigis nin, sed ĉio havas finon. Volontuloj, tamen, daŭrigis la kunestadon. La oficistino s-rino Janina akompanis nin al eksterordinara loko “Diabla kavo” – al la kosmodevena kavo, kiu estas eĉ pli ol 150 metroj profunda. Parto de la partoprenintoj ne preterlasis laŭvojan antikvan urbon *Trakai*. Belega do estas nia Litovio !!

Stanislava Sobanska; fotoj de Virginija Valuckienė





FOTOGRAFIA  
LIRIKULO  
RIMANTAS  
DICHAVIČIUS

La fama litova pentristo kaj fotoartisto, libroeldonisto pri nuntempa arto **Rimantas Dichavičius** /*Rimantas Diĥaviĉjus* naskiĝis la 1an de marto 1937 en familio de terkulturisto, en okcidenta Litovio. En la jaro 1945, apenaŭ 8-jara, li kun la gepatroj kaj la avo estis ekzilita ĉe Uralon (Rusio). La patrino mortis laŭvoje al la ekzilo. Post monato al la eterneco foriris la avo. Rimantas restis sola kun la patro. Ankaŭ tiu baldaŭ mortis, tiel la estonta artisto trafis infanan hejmon. Post ses jaroj al Siberio venis onklino de Rimantas, kunprenis lin kaj ankoraŭ du infanojn – gefratojn kaj venigis ilin al si, en urbon *Ŝiauliai*. Reveninte al la patrujo Litovio, jam preskaŭ forgesinta paroli litove, R. Dichavičius lernis en rusa lernejo de la urbo. En 1957 li finis Lernejon de Adopta Arto en Kaŭno, kaj en 1963 Grafikan fakultaton de Vilna Arta Instituto (nun – akademio).

R. Dichavičius ilustris pli ol 30 librojn, aranĝis aspekton de pli ol 200 grupaj eldonaĵoj. Lin disfamiĝis, lia vizitkarto iĝis, la eldonita en 1987, en Vilno, fotobilda albumo de nudaĵoj *Žiedai tarp žiedų* (floroj inter floroj). En tiama Sovetunio la albumo elvokis grandegan interesiĝon de la socio kaj poste estis reeldonita eĉ trifoje – en Litovio, Germanio kaj en Rusio. Pli poste, jam en 2004, li eldonis majstre komputile finaranĝitan fotobildan albumon *Vizijos* (vizioj).

R. Dichavičius aranĝis pli ol 50 personajn kaj pli ol 300 grupajn ekspoziciojn en Francio, Usono, Rusio, Germanio, Pollando, Ĉekio, Finnlando, Svedio, Hungario kaj aliaj landoj. Tiel la fotoartisto akiris la internacian agnoskon. En 1994 Internacia Federacio pri Arta Fotografio (FIAP) atribuis al li honornomon de artofotografisto (AFIAP).

Inter la plej gravaj publikigitaj kreaĵoj de R. Dichavičius estas cikloj de fotobildoj *Žiedai tarp žiedų* (1987-1996), *Lietuvos etnografija* (etnografio de Litovio, 1960- ...), *Formų pasaulyje* (en la mondo de formoj, 1965- ...), *Vizijos*, *Kultūros darbuotojų portretai* (portretoj de kulturagantoj).

*Litova Stelo* intervjuis la eminentulon **Rimantas Dichavičius**.

**Fotografas, precipe nun, tre multaj. Tamen malmultaj iĝas artistoj de ĉi tiu branĉo. Kiu estis via vojo al fotoarto? Kaj ankoraŭ, kio estas por vi la fotoarto?**

La unuan fojon fotilon mi prenis kiel studento de Arta Instituto. Dum studentaj etnografiaj ekspedicioj al ni iam tedis pentri kaj ni pripensis “faciligi” nian laboron – ĉion foti kaj poste transpentri. Tiam mi eksentis ne nur dokumentan, sed ankaŭ estetik-an gangon de fotoĵoj kaj serioze interesiĝis pri fotografado. Min komencis logi formoj de nekonataj objektoj. Aperis deziro rafini belecon de reala vivo, ties harmonion. En multaj miaj fotoĵoj estas fiksita fraŭlina juneco. La plej bela fraŭlino estas deksep-jara, sur fotoĵoj ŝi tia postrestos – ankaŭ post cent jaroj ŝi estos deksep-jara. Iam mi trafis surtomban skulptaĵon – ĉizitan el ŝtono junan knabinon. La skulptaĵo havis, eble, cent jarojn. Tiam aperis ĉe mi la ideo: la vivo estas kurta, la belo estas efemera, sed la arto estas eterna. Necesas haltigi la momenton. Mi konfesu – mi jam griziĝis, sed mi ankoraŭ malsatas, ŝajnas al mi, ke mi miajn la plej belajn faraĵojn ankoraŭ ne efektivigis. La fotografado estas malsano je kiu estas agrable malsani sen deziro saniĝi.

**Kiel en via kreado aperis la temo de virina nudaĵo? Kiel vi palptrovis la arton kaj la respekton tie, kie multaj vidas vulgarecon?**

Min ĉiam imponis plastikeco de la homa korpo. Interesis min ne nur la korpa beleco, sed ankaŭ la spirito, enanta kaj radiantan en ĝi. Mi strebis al korpa lirikeco kaj poetikeco, sed ne al nudeco por nudeco. Mi deziris demonstri junecon, ĝian efemerecon kaj fragilecon. Ankaŭ via panjo estis virino, ŝi naskis vin, oferis sin. La virinoj estas kiel potenco de tersino. La virino estas sankta. Tamen ŝi iam estas vulgaregata ĝis abomeneco. Rigardu, la pornografiaj revuoj estas plenaj da biologia primitiveco. Sed ja la tasko de la arto estas – leveti homon, helpi al tiu. Ja en la mondo ekzistas tiaj eldonejoj, kiuj – se intima loko ne videblas, traktas la varon malbona. Tio maldignigas kaj virinon kaj nocion de arto. Nur la arto helpas al homo deiri de sia biologia naturo. Tuta arto baziĝas sur homa spirito. Tuta helena kaj romana kulturo. Nudaj figuroj dum la mezepoko estis subpremataj. Renesanco denove malfermis la Pandoran skatolon. Mia generacio kreskis en idealoj de la klasika epoko. Sovetuloj denove subpremis. Dum la soveta epoko ne liciis ami virinon pli ol la komunistan partion kaj ĝian gvidantaron. Denove necesis dekjaroj por ke ĉi tiu eterna temo denove renaskiĝu en la verkado.

**En Litovio oni nomas vin “Klasikulo de nudaĵa fotoarto”. Kion, krom la nudaĵoj, vi fotas, kiel vi konformigas vian grafikistan, dezajnistan kapablon?**

Nudaĵoj estas pli malgranda parto de mia kreado. Mi fotas ĉion, kio al mi imponas. Vizaĝojn. Gravas al mi du polusoj de la vivo – juneco kaj maljuneco. Mi ĉirkaŭ vetu-





turis vilaĝojn de Litovio. Mi fiksas ĝian naturon kaj etnografion. En mia fotoarkivo jam estas ĉirkaŭ duonmiliono da fotoj. La edzino Valerija ĝin ordigis kaj ŝlisis – ŝi ne enlasas min tien. Se mi ekbezonas iun fotojon, ŝi iras tien kaj dum kelkaj minutoj trovas. Mi ĝojas, ke mia edzino eltenis min dum tiom da jaroj, toleris. Havi bonan edzinon estas Dia donaco. Mi multe laboras ilustrante artolibrojn, finaranĝante artokalendarojn. Mi aranĝis kaj eldonis pli ol dekon da kalendaroj *Talentu ir Ŝirdimi* (per talento kaj koro) pri litovaj artistoj – estis prezentitaj pli ol cent aŭtoroj.

Mi kreis dezajnon por kompaktoj. Ekzemple por la disko *Amžiu Dialogas* (dialogo de jarcentoj) de famaj litovaj muzikistoj Petras Vyšniauskas ir Antanas Smolksus, por la disko *The Art of dramatic soprano* (la arto de drama soprano) de fama kantistino Nomedas Kazlauskaitė.



*Eksponejo "Prospekto galerija". Ekspozicio "ILI ESTIS INTER NI" de Valerija DICHAVIČIENĖ (maldekstre de R. Dichavičius)*

**En Litovio estas multe da kapablaj pentroartistoj, fotoartistoj. Vi, kiel eldonisto, diskonigis plurajn el ili. Kaj ĝenerale, ĉu ekzistas problemoj pri diskonigo de artistoj?**

Ni havas centojn da artistoj. Poetoj kaj verkistoj dum sia vivo eldonas po almenaŭ kelkaj libroj, sed pentroartistoj povas eldoni eĉ ne unu. Asocio de litovaj pentroartistoj dumjare eldonas nur du aŭ tri kolektojn. Tial multaj pentroartistoj eĉ dum 100 jaroj ne ekvidos siajn albumojn. La financaj leĝoj estas tre sendankaj pri koloraj eldonaĵoj. Se



ni deziras eldoni monografion de iu artisto aŭ pli seriozan katalogon, devas enesti kaj koloraj fotoj, kolora skenado, retuŝoj kaj ĉio alia. Ĉio tio kostas. Estas bedaŭrinde, sed ĉe ni oni ĉion mezuras per mono. Kiam mi ion proponas, oni tuj demandas min, ĉu tio debitos, ĉu tion oni aĉetos. La albumo, malplikosta ol 100-lida estas malprofita. Sed kiu pagos pli ol 100 Lidojn? Tamen artoeldonaĵoj estas necesaj por la kulturo kiel aero kaj akvo. Min doloras, kiam altnivelaj artistoj estas damnitaj al forgeso. Ofte ili fariĝas ne bezonataj. Oni estas devigitaj la monon perlabori alie, kiel nekvalifikita laboristo. Mi, eldoninta plurajn albumojn nenion perlaboras. Tamen mi ne trankviliĝas – mi pretigas eldonaĵon *Artistoj por renaskiĝinta Litovio*.



*En ekspozicio. E. Dichavičius kun latva koleginino*

### **Artistoj por renaskiĝinta Litovio, do. Kio estos ĉi tiu eldonaĵo?**

Estos albumo *Laisvės rūbas* (vesto de libero). Post liberiĝo de soveta subpremo venis LIBERO. Libero devas esti videbla kaj dece vestita. Kiel aperis vesto de sendependa Litovio? Ĝi ne estas tute nova, sed kreita, rekreita sinbazinte sur ne ankoraŭ neniigita pasejo, historiaj faktoj. Estas jen litova mono, vestaĵoj de armeo kaj polico, honorigaj signoj, blazonoj de urbetoj, ŝtata heraldiko, signoj kaj firmaa stilo de niaj entreprenoj. Estas tio eta kaj dekora dezajno. Kiu ĉi tion kreis, malkovrinte sian talenton. Kelkdeko da artistoj. Ĉu iliaj nomoj estas konataj al la socio? Sentante aflikton pri la gefratoj de mia

profesio, mi deziras diskonigi ilin, estimi ilin pro ilia grava laboro. Staras monumentoj por erlstaraj homoj de nia popolo, por pereintaj, murditaj partizanoj. Estas konkretaj aŭtoroj. Ankaŭ ili devus esti pli diskonigitaj. Mi opiniis, ke ĉiujn ili estos facile prezenti. Pasis jam tri jaroj. Mi laboris, kolektis, kompilis. Jam kolektiĝis 100-150 aŭtoroj el tuta Litovio, pli ol 600 paĝoj (formiĝus du volumoj). Tiom multe da talentaj kaj interesaj homoj!



Jen kapabla grafikisto kaj pentristo Kęstutis Grigaliūnas, kiu aranĝis ekspozicion de nuntempa arto "El arkivoj de KGB". Estis fotoj-portretoj de alkape pafmortigitaj litovaj homoj, junaj, belaj, grandaĝaj kaj adoleskantoj. Aŭ jen – universala grafikisto, heraldikisto Arvydas Každailis, rekreinto de historia standardo de Litovio. Li kreis ventomontrilon por la turo de rekonstruita Palaco de Ŝtatestroj de Litova Grandduklando. Ĝi iĝas ankoraŭ unu simbolo de la urbo Vilno. Ni do demonstras ne nur kiajn aŭtorojn ni havas, sed ankaŭ kiel per vidperceptaj aĵoj estas formata impresajo de la Ŝtato. Restas laboro por ankoraŭ unu jaro.

**Al ĉiuj gastoj de nia revuo ni demandas tradicie: ĉu vi iom aŭdis pri Esperanto, ĉu iam renkontiĝis kun esperantistoj?**


Ĉu mi renkontiĝis? Jes. Multfoje. Mi scias ankaŭ tion, ke dum la soveta periodo esperantistojn oni konsideris homoj danĝeraj. Laŭ ordono de Stalin oni ekzilis ilin, mortpafis. Cetere, mia edzino en juneco iom lernis Esperanton, sed nun jam ĉion forgesis.

La bildoj de Rimantas Dichavičius el la albumo *Vizijos*. La fotoj de Stasys Paškevičius

## VOLUMO PRI RELIGIAJ KAJ FILOZOFIAJ IDEOJ DE ZAMENHOF

Sub la titolo "Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono" aperis la aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco, kiu okazis en la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko en 2009 (Pollando). La volumon redaktis Christer Kiselman, kiu ankaŭ gvidis la konferencon.

En la volumo aperas la prelegoj de Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki) el Israelo/Japanio ("Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto"), Vytautas Šilas (Šilas) el Litovio ("Zamenhof kaj Litovio. Nia judo"), Zbigniew Romaniuk el Pollando ("Novaj faktoj el la vivo de la Zamenhof-familio") kaj Christer Kiselman el Svedio ("La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj"). Krom ili la aktoj konsistas el antaŭparolo de Ch. Kiselman, enkonduka salutmesaĝo de Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj la konkluda parolado de Humphrey Tonkin ("Zamenhof hodiaŭ kaj morgaŭ"). En la konferenco prelegis ankaŭ Aleksander Korĵenkov el Rusio ("Aktualaj problemoj de zamenhofologio"), kies teksto aperis en la revuo "La Ondo de Esperanto" (n-roj 2-4/2009).



"Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof", grandformata kaj plaste kovrumita, havas 65 paĝojn. Ĝia prezo ĉe la Libroservo de UEA estas €9,90 (plus sendokostoj kaj, en EU, imposto 6%; ekde 3 ekz. rabato de 1/3).

\* \* \* \* \*

*Gazetaraj Komunikoj de UEA,*  
N-ro 378, 2010-05-10

## *Enhavo*

### 1. *Christer Kiselman. Antaŭparolo*

### 2. *Louis C. Zaleski-Zamenhof. Salutmesaĝo enkonduka*

### 3. *Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki). Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto*

**Resumo.** Ekzamenante pensojn kaj agadojn de Zamenhof kaj la socian kaj lingvan fonon de la tempo kaj loko de lia juneco, tiu ĉi artikolo montras ke li iniciatis Esperanton ne nur kiel lingvan rimedon por unuigi la homaron, kiel multaj esperantistoj pensas, sed ankaŭ kiel la lingvan solvon por la juda problemo, kiu turmentis lin ekde lia juneco en Bjalistoko, anstataŭ judismo, cionismo, hebreismo kaj jidismo.

### 4. *Vytautas Silas (Vitaŭtas Ŝilas). Zamenhof kaj Litovio. Nia judo*

**Resumo.** Historiaj, kulturaj kaj parencaj ligoj de L. L. Zamenhof, homamanto kaj aŭtoro de Esperanto, kun la historia Litovio estas traktataj. Litovion Zamenhof nomis sia patrujo. La aŭtoro eksplikas ĉi tiun konfesion. Ĉe la sojlo de la deknaŭa-dudeka jarcentoj ne nur la naskiĝurbo de Zamenhof, Bjalistoko, sed ankaŭ tri loĝlokoj de la nuntempa Litovio, ligitaj kun lia restado (Vejsejo, Vilno, Kaŭno) distingiĝis pro konsiderinde multnombraj judaj komunumoj. Sur ĉi tiu historie litova teritorio formiĝis litvakoj kaj ilia litova dialekto de la jida. La aŭtoro akcentas la neceson konscii ke Zamenhof estis eksterordinara litvako. La artikolo preparolas memorigajn Zamenhof-lokojn kaj defendas hipotezon pri la kaŭzo, kial Zamenhof en 1885 forlasis la urbeton Vejsejo. La aŭtoro atentigas, ke la domo de Sender-Aleksandro Zilbernik, bopatro de Zamenhof kaj la unua kaj ĉefa mecenato de Esperanto, la domo kie restadis Zamenhof, urĝe bezonas renovigon - kaj distingon per memortabulo.

### 5. *Zbigniew Romaniuk. Novaj faktoj el la vivo de la Zamenhof-familio*

**Resumo.** Surbaze de ampleksa serĉado en oficialaj arkivoj ni prezentas novajn faktojn pri la vivo de la familio de Zamenhof. Ekzemple estas nun klare ke Marko Zamenhof naskiĝis en Suwalki, ne en Tykocin.

### 6. *Christer Kiselman. La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj*


**Resumo.** Surbaze de leteroj de Zamenhof kaj aliaj dokumentoj ni sekvas la evoluon de liaj pensoj pri hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio. Ni provas prilumi kiel la projekto de homaranismo kreskis el liaj unuaj klopodoj savi la judan popolon el ĝia malfeliĉega stato, kaj kiel liaj ideoj pri la rolo de lingvoj sangiĝis dum lia vivo. Temas pri tri malsamaj roloj de eblaj lingvoj: diserva lingvo (en lia kazo la hebrea kaj la aramea); instrua lingvo (la rusa); kaj lingvo por interkompreniĝo kun samsuferanoj alilandaj (en lia kazo mankanta). Al tiuj ĉi aldonendas la ĉiutaga lingvo, ne necese egala al unu el la tri menciitaj (por la plimulto de la judoj en orienta Eŭropo tiu ĉi estis la jida). Ni esploras kiel li volis krei novajn lingvojn por tiuj funkcioj kaj trovas paradokson pri lia sinteno al lingvoj: lingvo estas gravega por la difino de ĉiu popolo, sed samtempe tiom malgrava ke oni povas enkonduki novan, senhistorian. Li komprenis la ajnecon de kulturaj esprimoj kaj religiaj kutimoj pli bone ol aliaj - jen ebla klarigo pri la manko de sekvantoj.

### 7. *Humphrey Tonkin Konkludo: Zamenhof hodiaŭ kaj morgaŭ*

### 8. *Programo de la konferenco 2009-07-30*



## INTERLINGVISTO ALOYZAS GUDAVIČIUS JUBILEAS



La 12-an de majo 2010 sian **70**-jaran jubi-leon solenis lingvisto, profesoro de la Universitato de *Šiauliai* (Ŝaŭla Universitato - *LS*), habilita doktoro de sociaj sciencoj, vicprezidanto de Litova E-Asocio **Aloyzas Gudavičius** /*Aloi:zas Gudavičjus*.

Prof. A. Gudavičius estas gvidanto de la katedro pri la rusa lingvo, instruas ĝeneralan lingvistikon, komparan semantikon, ties fundamenton, etnolingvistikon, interlingvistikon, la polan lingvon kaj deklaras jenajn sciencajn interesojn – ĝenerala, etna, kaj kompara lingvistiko, interlingvistiko.

Prof. A. Gudavičius estas organizanto de la tradicia internacia scienca konferenco „Bildo de la mondo en la lingvo“, respondeca redaktoro de universitata revuo *Filologija* (filologio), kiu estas referata en internaciaj datumbazoj. Li estas membro de Litova Sciencista Asocio, prezidanto de LIONS-klubo *Alka* en *Šiauliai*.


A. Gudavičius esperantiĝis studante en Pedagogia Instituto de *Šiauliai*. Tiam li eklernis Esperanto ĉe bonega E-instruisto D. Balčiūnas kaj, ricevinte adresojn de li, ekkorespondis en Esperanto. En 1960 li, tiam studento de la 4-a kurso, en la instituta gazeto publikigis artikolon pri agado de instituta E-rondeto. Kun aliaj studentoj li preparis E-murgazeton, tamen ĝi ne plaĉis al estraro de la instituto kaj estis dependigita. Gvidata de prof. V. Sirtautas (1921-2008), en 1960 la studento A. Gudavičius preparis scienca laboron *Esperanto kiel ilo de interkomunikado*. En Studenta Scienca Societo li legis longan raporton pri historio kaj nuntempo de Esperanto. En 1961, estante 21-jarulo, A. Gudavičius unue partoprenis E-renkontiĝon – la 3-an Ĉebaltan E-tendaron (nun E-kongreso *Baltiaj E-Tagoj* - BET).

Fininte la studojn A. Gudavičius deflankiĝis de E-movado kaj revenis al ĝi nur post la 1990-a jaro. En 1993 A. Gudavičius estis elektita al Estraro de Litova E-Asocio kaj ekde tiam ĉiam estas vicprezidanto de Litova E-Asocio.

En 2005, dum la jubilea, 90-a UK en Vilno, prof. A. Gudavičius rektoris la Internacian Kongresan Universitaton kaj prelegis tie pri la temo “Etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto”. En 2007 en *Šiauliai* okazis la kongreso BET-43 kaj tiam prof. A. Gudavičius rektoris tiean Someran Universitaton. La partoprenintoj memoras liajn prelegojn *Verda koloro en litova lingvo* kaj *Genro kaj sekso en Esperanto*. En 2009 la profesoro en Esperanto prelegis pri interlingvistika temo dum la Interlingvistika konferenco en la estona universitata urbo Tartu kaj estis honorpremiita per internacia premio *Academicus Ariste*. Prof. A. Gudavičius volonte kunlaboras kun esperantisto

de *Šiauliai*: jen reveninte de Universalaj Kongresoj de Esperanto li ĉiam rakontas en la klubo „Ruto“ pri la kongresoj, kongresaj landoj, loka E-movado. Li ofte dum la klubkunvenoj legas pri sciencaj kaj lingvistikaj novaĵoj, kelkfoje helpis trovi ejojn por E-kursoj, kiujn organizis E-klubo „Ruto“.

Kara nia samideano Aloyzas! Akceptu nian rut-verdan sinceran saluton okaze de Via honora jubileo. Ni deziras al Vi multajn longajn produktivajn sanplenajn jarojn en Via vivagado!



*Kongresanta prof. A. Gudavičius kun eksterlandanino*

**Esperantistoj  
de la klubo “Ruto”, *Šiauliai***

La artikolon por LS sendis *Klaudija Margevičienė*

**P.S.** Litovaj informaj fontoj prezentante profesoron A. Gudavičius neniel mencias Esperanton, sed ni ja scias, ke la profesoro estas esperantisto kaj li pri la lingvo Esperanto al siaj studentoj rakontas dum la interlingvistika kurso. Do, la gazeto *Šiaulių universitetas* (Universitato de *Šiauliai*, 2010 n-ro 5) memorigas, ke en 2009 en la Universitato atribuis al prof. A. Gudavičius la titolon *Scientisto de la Jaro* kaj akcentas, ke A. Gudavičius estas la unua litovo, kiu ricevis *Ariste*-premion, sed prisilentas Esperanton. Povas estis, la profesoro men tion ne tre akcentadis .... Okaze de la 70-jariĝo la sciencopopulariga revuo *Mokslas ir technika* (Scienco kaj tekniko, 2010/04, p. 23) publikigis artikolon de Sigita Inčiūrienė *Prof. Aloyzas Gudavičius: Kalba – esmingiausias tautos požymis* (prof. Aloyzas Gudavičius: "La lingvo estas la plej esenca trajto de la nacio"). La artikolo prezentis la profesoron kiel lingvisto, prezidanto de Universitata Senato. Tamen laŭ la artikolo oni povas nur supozi, ke li estas esperantisto. El la artikolo ni ekscias, ke prof. A. Gudavičius fariĝis interlingvisto, ĉar "ekinteresiĝis pri historio kaj teorio de planitaj lingvoj, unue pri tiu de Esperanto" kaj "inter fondintoj de la premio *Academicus Ariste* estas UEA kaj Tartua E-Asocio". Esceptis la regiona gazeto *Šiaulių kraštas* (ŝaŭla regiono), kiu en la artikolo *Monpotenco malagrabiligas profesoron* (trad.) publikigis la konfeson: Por mi Esperanto estas kvazaŭ sporto, interesa kiel lingva fenomeno.

**Tre estimata profesoro A. Gudavičius, akceptu ankaŭ nian sinceran gratulon okaze de via 70-jariĝo!** Sukceson en ĉiuj sferoj de via agado kaj meritan bonfarton! La jubileo estas grava evento ne nur por viaj proksimuloj, ne nur por la urbaj esperantistoj, sed ankaŭ por multaj legantoj de "Litova Stelo".

**LS**

## FESTENO EN "JUNECO"

La 10-an de majo 2010 kunvenintaj membroj de Vilna junulara E-klubo "JUNECO" dum sia lunda kunveno festenis pri la 50-jariĝo de eksprezidanto eĉ de du junularaj E-kluboj **Kazys Tamošėtis**. Pri tio aperis de A. Karpovas filmita video en la retejo de Litova E-Asocio. Iru do al:

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=novajoj&no=736> .

K. Tamošėtis naskiĝis la 9-an de majo 1960 en vilaĝo *Vailiškiai* (distrikto *Panevėžys*). En 1984 li sukcese finis Vilnan Inĝenieran Instituton (nun Vilna Gedimina Teknika Universitato) kaj akiris specialecon de arkitekto. Kiel arkitekto li laboris en Kaŭno kaj Vilno, la grandurboj de Litovio. Laŭ liaj projektoj estis konstruitaj diversaj konstruaĵoj en Vilno, *Klaipėda*, *Druskininkai*. En la jaro 1991 K. Tamošėtis establis akcian projektadan entreprenon "Nadruva" (<http://www.nadruva.lt>) kaj ĝis nun direktoras ĝin ([kazys@nadruva.lt](mailto:kazys@nadruva.lt)). La entrepreno projektas loĝdomojn (unuloĝejajn kaj mult-loĝejajn), konstruaĵojn industriajn kaj sociajn (ekzemple, preĝejojn).



Kazys Tamošėtis esperantistiĝis en 1980, vizitante E-kurson, kiun tiam gvidis Vytautas Šilas. Samjare li fariĝis aktiva membro de la Vilna junulara klubo "JUNECO".

Li partoprenis en E-tendaro OKSEJT en Ivanovo, en organizataj de "Juneco" *Ignalinaj Boatadoj* (ĝis nun!) kaj aliaj E-aranĝoj.

Ekde 1984 K. Tamošėtis laboris en Kaŭno kaj tie en 1985 kunfondis E-klubon de Kaŭna junularo "Ondo" kaj ĝis la fino de 1988 prezidis ĝin. En 1988 li translokiĝis al Vilno kaj fariĝis prezidanto de "Juneco" (1988-1991).

K. Tamošėtis partoprenis en diversaj grandaj internaciaj E-aranĝoj. Ekzemple, en Varsovia UK (1985), en ISO-kongreso (1989, Neumunster, Germanio), en Vilna UK (2005). Nun K. Tamošėtis estas estrarano de Litova Esperanto Asocio kaj honora membro de "Juneco". Okaze de la solidiĝo ĉiuj geamikoj deziras al KAZYS TAMOŠĖTIS ĉiaman belfarton! Memoru, ke *Juneco* estas printempo de *Beleco*!

*Eksjunecano*

## UTILA KAJ AGRABLA

La 8-9-an de majo ni, kelkaj gejunecanoj, bonege pasigis tempon en Esperantista-ĵurnalista tendaro-seminario en *Aukštadvaris*. La programo estis bone planita – inter „seriozaj“ programeroj ne mankis ankaŭ la distraj. Do, ni ĉiuj diskutis pri problemoj kaj ĝojoj de E-movado kaj samtempe ripozis en belega naturo.

Al ni tre plaĉis kvizo pri Esperanto movado, kiun gvidis Vytautas Šilas. Ni eksciis multe pri E-verkistoj kaj E-historio. Post la kvizo ĉiuj partoprenintoj ĝojis pro ricevitaj valoraj prizoj. Bone, ke ankaŭ komencantoj ne estis forgesitaj. Por ili estis organizita leciono de lingvo Esperanto. Progresantoj samtempe diskutis pri estonteco de la evoluo de la homaro. Tiu ĉi temo estas grava kaj interesa por ĉiuj.

Diskutojn ŝanĝis ludoj per pilko kaj akvaj proceduroj en banejo kaj apuda lago. Ne estis forgesitaj aliaj okazoj – naskiĝtago de Vida Čojienė kaj nomtago de Stanislava Sobanska – ili estis gratulitaj per kantoj kaj ricevis kronojn el floroj.

La unuan tagon de la seminario kronis E-kantoj ĉe la lignofajro, akompanitaj per gitaro, kiun ludis ĉi-foje eĉ du gitarludistoj Vida Čojienė kaj Vytautas Šilas.

Matene de la dua tago nin vizitis vilaĝestrino kaj prezidantino de komunumo de *Aukštadvaris*. Ili rakontis pri problemoj, zorgoj kaj ĝojoj de la vilaĝa komunumo. Ni pridiskutis eblecon disvastigi Esperanton inter diversaĝaj loĝantoj de *Aukštadvaris*, kaj kunagis per diversaj projektoj.



Grandan dankon al la organizintoj de Esperantista-ĵurnalista seminario-tendaro pro la ebleco pasigi la tempon kun interesa, vivĝojplena kaj agema kompanio, kune ĝoji pri Esperanto kaj naturo! Ni esperas, ke nia kunlaboro sukcese daŭros.

Gejunecanoj: *Jolita Ružauskienė, Marijus Dilba, Jolanta Dudėnaitė*





## AKADEMIO DE ESPERANTO

La Akademio de Esperanto estis fondita en 1905 en la unua Universala Kongreso de Esperanto, laŭ propono de Zamenhof, sed tiam sub la nomo "Lingva Komitato". La nomon "Akademio de Esperanto" portis unue supera komisiono de la Lingva Komitato. En 1948 la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kunfandiĝis en solan korpon nomatan "Akademio de Esperanto".

La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

Por la legantoj de Litova Stelo, kiel ekzemplon de funkciado de la Akademio, ni prezentas (iom mallongigite) unu el ĝiaj decidoj.

### ***PRI LA REFLEKSIVO***

En Majo 1971, sekve de raporto de la Direktoro pri la Gramatika Sekcio, D.B. Gregor, la Akademio, post zorga esplorado de la demando, oficialigis unuanime jenan regulon pri la refleksivaj pronomoj kaj adjektivoj; ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

#### **Regulo**

*I. La refleksivaj pronomoj (serio "si/sia") rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.*

*II. Ifoje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj "kiu(j) est-" ekz-e ĉe apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz-e: "kastelo fama pro sia historio" — sed "li ekvidis sian fraton Benjamenon, la filon de lia patrino" t.e. Benjamenon, kiu estis la filo de lia patrino).*

*III. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto, ekz-e "siatempe" ktp.*

*IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.*

*Gvidaj Ekzemploj*

- I.** Vi lavas vin kaj li lavas sin.  
 Ŝi estas amata por si, ne por la doto.  
 Ŝia propra patrino forpelis ŝin de si.  
 Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.  
 Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.  
 Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.  
 La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.  
 La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.  
 La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.  
 Marta admiris lian fidon al ŝi (al M.).  
 Marta admiris lian fidon al si.
- II.** Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.  
 Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.  
 Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.  
 Ili vizitis la muzeon faman pro siaj pentraĵoj.
- III.** Moki ies fidon al si mem.  
 Oni komprenis liajn gestojn per si mem.  
 Ni ne povas koni la realon en si mem.  
 Metu ĉion en sian lokon.  
 En ĉiu kranio estas sia opinio.


Kiel antaŭ nelonge informis la estraro de la Akademio de Esperanto en la unuaj monatoj de la jaro 2010 okazis la reelekto de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto. Nun la Akademio konsistas el 44 membroj:

Perla Ari Martinelli, Marc Bavant, Vilmos Benczik, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, Renato Corsetti (sekretario), Marcos Cramer, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta (vicprezidanto), Michel Duc Goninaz, Lena Karpunina, Gbeglo Koffi, Paul Gubbins, Miguel Gutierrez Aduriz, Otto Haszpra, Christer Kiselman, Boris Kolker, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Lowenstein, Ma Young-tae, Carmel Mallia, Stano Marček, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Carlo Minnaja, Paŭlo Moĵajev, Brian Moon (vicprezidanto), Barbara Pietrzak, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz, Baldur Ragnarsson, Francisko Simonnet, Alexander Shlafer, Saka Tadasi, Humphrey Tonkin, Amri Wandel, **John Wells** (prezidanto), Bertilo Wennergren, Xie Jü-ming, Yamasaki Seikô.

\* \* \* \* \*

Pardonpeto pro erarigo. En *LS* n-ro 2 de 2010, pĝ. 22 ni malĝuste sciigis, ke forpasinta veterano Aloyzas VALA naskiĝis la 1-09-1968, fakte li naskiĝis la 5-08-1943 (la jaro 1968 estas la jaro de lia edziĝo). Pardonu! *LS*

## E-VIKIPEDIO ANTAŬENMARŜAS !



**VIKIPEDIO** estas interreta enciklopedio aperanta en pli ol 200 lingvoj! Ĉiam kreskas la kvanto de la enciklopediaj artikoloj nacilingvaj. En la artikola listo enestas la temoj, kiuj laŭ la vikipedio-kunlaborantoj nepre enestu en ĉiu vikipedio; enestas ankaŭ Esperanto, dume sur la paĝoj de entute 18 lingvoj. Progresas ankaŭ Esperanto-Vikipedio mem. Ĝi ricevis rekonon pro la plej granda kresko de la mil "havendaj artikoloj" dum la aprilo 2010. Por kompari kaj reale aprezi la atingiĝon komparu: la ĝisnuna kvanto de esperantigitaj artikoloj estas jam preskaŭ

131 mil kaj kreskas (oktobre 2009 estis 120 mil). Kompare, sur la paĝoj de la litova Vikipedio estas pli ol 180 artikoloj. Ni daŭrigu la komparon. La kvanto de artikoloj, ekzemple, en la rusa Vikipedio estas 547 mil, en la finna 240 mil, nederlanda: 606 mil, dana 130 m, hispana 607 m, franca 957 m, itala 696 m, hungara 163 mil.

Kiom ofte iu artikolo en Vikipedio estas vizitata? Fondaĵo Vikimedio, kiu prizorgas Vikipedion, longan tempon ne kuraĝis publikigi la statistikon. Sed nun esperantistoj - kaj ĉiuj aliaj - povas vidi, ĉu iliaj artikoloj vere estas legataj. La statistiko montras, ke februare en la anglalingva versio pri Vikipedio la artikolo pri Esperanto nur dum februaro 2010 estis legita 57.746 fojojn! En la esperanta versio de Vikipedio la plej populara unuopa artikolo februare ial estis pri la tupia lingvo, grupo de dialektoj parolataj en Sudameriko. Ĝi estis vidita entute 18.612 fojojn. Sur la dua loko estis la artikolo pri Esperanto, rigardita 5.814 fojojn, kaj sur la tria loko la artikolo pri Vankuvero, kun 3.900 vizitoj februare 2010. La ĉefpaĝo de la E-Vikipedio estis konsultita 60.318 fojojn. La ciferoj por la esperantlingvaj artikoloj estas ja ankoraŭ malpli altaj. *Zamenhof* trovis la interesiĝon de 581 uzuloj.

### RIMARKO

En la unuaj jaroj de interreto oni ankaŭ uzis la vorton "hejmpaĝo", paŭsado de la angla *home page*, kiu tamen ŝajnas esti nenial preferinda al la pli esperanteca "ĉefpaĝo". Krome, dum en pluraj nacilingvoj la ekvivalento de "ĉefpaĝo" ankaŭ priskribas la komencan paĝon kiu aŭtomate malfermiĝas ĉe ŝaltado de retumilo, en Esperanto tiu paĝo nomiĝas "eka paĝo" (aŭ ekpaĝo).

## CENTRO LUDOVIKO ZAMENHOF

En Bjalistoko, tuj antaŭ la 94-a UK de Esperanto estis inaŭgurita Centro Ludoviko Zamenhof. Dum la kongreso en la Centro funkciis tre profesie aranĝita ekspozicio, prezentanta Bjalistokon de juneco de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Multaj kongresanoj ĝin vizitis kaj estis bone impresitaj pri ĝi.

La celo de la Centro estas popularigi la lingvon Esperanto, ĝian kreinton Zamenhof kaj la Esperanto-movadon en Pollando kaj en la tuta mondo. Nun, krom la konstanta ekspozicio, la Centro Ludoviko Zamenhof ofertas ankaŭ tre diversajn portempajn ekspoziciojn. Oni povas vidi **E-eldonaĵojn** laŭteme ligitajn kun Zamenhof, Bjalistoko kaj Podlaĥia provinco. La oferto de la centro enhavas temojn ligitajn kun multkultura karaktero de Bjalistoka regiono, ĝia historia fono kaj la vivo kaj verko de Ludoviko Zamenhof.

*La centro starigis la trilingvan (pola, angla, Esperanto) retpaĝon: <http://centrumzamenhofa.pl>.*

*En ĝi troviĝas ĉefe informoj pri la agado de la Centro, ties ekspozicioj kaj organizataj projektoj.*

Kiel informas la retpaĝo de la Centro Ludoviko Zamenhof, la centro disponas la diskon "Verda Disco", multmedian kurson de Esperanto kaj kelkajn eldonaĵojn en tiu ĉi lingvo, kiuj estas ricevitaj de Bjalistoka Kulturcentro, ankaŭ de organizintoj de la 94-a UK de Esperanto, Bjalistoka E-Societo kaj individuaj donacintoj. Ĉiujn ĉi eldonaĵojn oni povas ricevi sen-page aĉetinte bileton por la konstanta ekspozicio - "Bjalistoko de juna Zamenhof".





Oni ofertas plurajn aktivaĵojn por infanoj (precipe de infanĝardenoj kaj bazlernejoj). Ili estas "interaktivaj metiejoj". La metiejoj estas ligitaj kun nia konstanta ekspozicio "Bjalistoko de juna Ludoviko Zamenhof". La infanoj dum ili estas tre aktivaj. Ili tie pentras, kantas, ludas puzlojn kaj ludojn kaj partoprenas multaj aliaj aktivaĵoj lernante multe pri la urbo kaj pri Ludoviko Zamenhof.



La Zamenhofa centro funkcias ĉe la strato Warszawska 19 (iam 15). Estas antaŭ nelonge rekonstruita domo, kiu estis konstruita antaŭ 1896 kaj apartenis al komercisto pri lanaj ŝtofoj Markus-Aron Gordon, ĉi tie sian sidejon havis filio de Riga Komerca Banko. En 1920 ĉi tie laboris Portempa Revolucia Komitato, gvidata de konata bolŝevika potenculo Feliks Dzierżyński, (aŭguste de tiu jaro el keloj de la konstruaĵo oni forkondikis 16 militkaptitojn kaj

ekster la urbo, ĉe la ŝoseo Północno-Obwodowa mortpafis ...).

La Centro Ludoviko Zamenhof kiel faro de polaj esperantistoj, de Bjalistoka municipo estas modela ekzemplo por litovoj – por iliaj komunumoj en Vejsejo kaj Kaŭno. Jen kiel necesas ekspluati ligon de sia urbo kun mondgrava figuro, kia estas Lazaro Ludoviko Zamenhof, por fari sian urbon pli alloga al vizitantoj landaj kaj eksterlandaj!

#### **Centro Ludoviko Zamenhof**

15-062 Bjalistoko, str. Warszawska 19, tel. (085) 676 73 67

**Ni invitas de mardo ĝis dimanĉo je la horoj 10.00-17.00**

Informojn pri la Centro Ludoviko Zamenhof disponigas:

Bjalistoka Esperanto- Societo: <http://espero.bialystok.pl>

## LITOVIO POR KARTVELAJ INFANOJ



La 1-an de majo 2010 Litova Televido okazigis bonfaran dissendon „Unu koro“ por subteni kartvelajn infanojn. Okazis koncerto, kiun gvidis gvidanto de bonfaraj dissendoj Edita Mildažytė, oni vidigis ankaŭ raportaĵojn el Kartvelio, intervjuojn kun konataj kartveloj – inter ili kun aktoro Vahtang Kikabidze, kantistino Nani Bregvadze, 9-foja mondĉampiono pri ŝakoj Nana Aleksandrija, baleta primadono Nina Ananiašvili.

E. Mildažytė rakontis, ke Kartvela ŝtato (Sakartvelo) pro la milito kun Rusio perdis grandan parton de sia teritorio. Sen hejmo restis pli ol 250 mil militrifugintoj, inter ili 70 mil infanoj. Iliajn vivrimedojn faras subvencio – 24 larioj monate (iom pli ol 10 €). La infanoj bezonas ne nur psikologian helpon, sed ankaŭ medicinan servon. Nur sole en Ĥaŝuri-regiono estas listo de 52 infanoj, kiuj bezonas protezojn, operaciojn ktp. Per kolektita mono oni okazigos helpon al ĉi tiuj infanoj, eble eĉ al aliaj. Estis anoncigitaj telefonnumeroj, unu por oferi 5 Lidojn, aliaj por oferi 10 Lidojn (ĉ. 3 €). Ĉe telefonoj deĵoris eĉ 20 popularaj personoj – la oferintoj de 10 Ld rajtis demandi al tiuj popularuloj. Inter la “deĵorantoj” estis aktoro Regimantas Adomaitis, kirurgo onkologo Karpel Babajan, aktorino kaj reĝisorino Galina Dauguvietytė, pastro Riĉardas Doveika, astrologino Palmira Kelertienė, verkisto Vytautas V. Landsbergis, stilisto Mantas Petruškevičius, ekonomisto Gitanas Nausėda, ankaŭ esperantisto Alfredas Maruška.

Litovoj, kiuj ĉiam simpatiis al liberaspiraj kartveloj, malgraŭ la krizo, oferis por kartvelaj infanoj entute 250 mil Lidojn (73 mil €). E. Mildažytė ĝojis pri la popularuloj – kiom ĉarmaj ili estas, ja dank` al la telefonaj interparoloj kun ili estis kolektita preskaŭ triono de la sumo. Cetere, inter tiuj, kiuj ricevis plej multe da demandoj estis la pastro R. Doveika, la ekonomiisto G. Nausėda kaj la astrologino P. Kelertienė. En la televida postkuliso oni ŝercis, ke dum la kriza periodo litovoj vidas la esperon en la ĉielo ...

Kortuŝe impresis la registrita sceno, kiam granda grupo da kartvelaj infanoj anticipe dankis pro la subteno litove: “Aĉiū Lietuva!” (dankon, Litovio!).



**2010-05-21**

**Dainius Radzevičius – nova  
prezidanto de Konsilio de Litova  
Radio kaj Televido**

La 18an de majo en kunsido de Konsilio de Litova Radio kaj Televido (LRT) kiel prezidanto de Konsilio de LRT estas elektita la prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio (LĴA) – Dainius Radzevičius. En la prezidanta posteno li anstataŭos antaŭ nelonge mortintan G. Ilgūnas.

Por D. Radzevičius voĉdonis 7 el 10 parto-prenantoj de la kunsido. Post la diskutoj en la voĉdonan bultenon estis enskribita unusola familinomo de D. Radzevičius. Dum la kunsido estis proponataj ankaŭ aliaj kandidatoj, tamen ili rifuzis pretendi al la posteno.

Kiel diris la nova prezidanto de Konsilio de LRT, jam en plej proksima tempo la konsilio diskutos "*ne nur pri ĉiu-tagaj aferoj, tamen tre serioze esploros, kion devus la socia telesendisto prezenti al televidantoj kaj radioaŭskultantoj*".

La konsilio sin turnos al Sejmo, kies delegito estis G. Ilgūnas, kun peto, ke ĝi nomumu novan membron.

En la konsilion D. Radzevičius estas delegita de Litova Asocio de Artkreantoj. Lia delegiteco finiĝos en 2014.

D. Radzevičius estas profesia ĵurnalista, laboris kiel konsultanto pri komunikado en la Registara Kancelario, gazetara reprezentanto de Departamento pri Kortumoj, laborulo kaj estro de Publika Servo en Jura Ministerio.

Laŭ aŭtoraj kontraktaj li kunlaboradis kun Litova Televido, televido *Vilniaus TV*, gazeto *Respublika*, estis redaktoro en televido *Vilniaus TV* kaj *11 kanalas*, verkis kaj gvidis elsendojn en televido *11 kanalas*, *Vilniaus TV*, radio *Žinių radijas*.

En 2008 Litova Esperanto-Asocio (prezidanto Povilas Jegorovas) kaj LĴA gvidata de D. Radzevičius organizis en Vilnius la unuan Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj. La komuniĝo inter Litova E-

Asocio kaj LĴA daŭras ankaŭ post la kongreso. En TTT-ejo de Litova Ĵurnalista Asocio estas paĝo Esperantininkų žurnalistų klubas (Klubo de esperantistoj ĵurnalistoj). Litovaj esperantistoj-ĵurnalistoj kaj Litova Ĵurnalista Asocio ĉiu-jare organizas tradiciajn komunajn seminariojn. Intervjuon kun D. Radzevičius publikigis *Litova Stelo* en ĉi-jara unua numero.

En la konsilio nuntempe ankaŭ laboras profesoro de Vilna Universitato Alvydas Jokubaitis (vicprezidanto), doktoro de humanitaraj sciencoj Auksė Balčytienė, ĵurnalisto Edmundas Ganusauskas, ĉefa redaktoro de kristana revuo *Artuma* Darius Chmieliauskas, poeto Marcelijus Martinaitis, pedagogo Audronė Pitrėnienė, pedagogo Eglė Pranckūnienė, ĵurnalisto Artūras Račas, ĵurnalisto Rimvydas Valatka, kina kaj televida reĝisoro Saulius Vosylius.

Konsilio de LRT estas la plej supera reganta organo de la socia tele-sendisto. Ĝi estas formata por 6 jaroj el 12 personoj – sociaj, sciencaj kaj kulturaj agantoj. Po 4 membrojn nomumas la ŝtatprezidento kaj Sejmo, po unu membron delegas Litova Scienca Konsilio, Litova Edukada Konsilio, Litova Asocio de Artkreantoj, Litova Episkopa Konferenco.

El: <http://barelo.blogspot.com/>, redaktata de *Antanas Grincevičius*, Vilno



*D. Radzevičius kun sia edzino Jūratė (de-live - la 2a kaj la 3a) kun litovaj ĵurnalistoj esperantistoj*


**P.S.**

Dainius Radzevičius kun sia edzino Jūratė Radzevičienė en 2008 estis registritaj kiel partoprenantoj de la 93-a UK de Esperanto en Roterdamo (iliaj kongresaj numeroj respektive estas: 1601 kaj 1600). Ili bone parolas la anglan, sed scipovas diri nur po iom da frazoj en Esperanto sed komprenas iom pli. Ili ĉeestis kelkajn programerojn de la UK.

*Litova Stelo*



## ĈIELARKA STANDARDO JAMAS EN LITOVIO



Jam ne la unuan fojon seksminoritatoj penis kun ĉielarka standardo demonstracii en centro de Vilno, la antikva ĉefurbo de Litovio. Kun seskolora standardo, kiu estas distingajo de lesboj, gejoj, biseksuloj, transeksuloj, homozigotoj kaj ?. La ĉielarka komunumo ĉiam ricevdas rifuzon de la urbaj potencoj. Post kiam en 2008 sian kategorian “ne” esprimis tiama urbestro Juozas Imbrasas, la prezidanto de Litova Geja Ligo (LGL) Vladimir Simonko minacis denunci Litovion al Strasburga Tribunalo. Finfine ĉi-jare, februare elektita nova urbestro Vilius Navickas (la foto supre) donis permeson por okazigi manifestacion “Por toleremo” (vere, ne sur urbodoma placo, kiel oni petegis, sed sur trankvila apudrivera strato de Nova urbo).

Kontraŭ la permeso de V. Navickas ekprotestis eĉ 53 litovaj parlamentanoj. Ili petis Ĝeneralan Prokuroraron “entrepreni agojn por defendo de socia intereso – bloki la planitan maje la homoseksualan manifestacion” kaj asertis, ke tiu “deliktus la Leĝon pri defendo de neplenaĝuloj kontraŭ negativa influo de publika informado, kontraŭus koncepton de Sejmo pri Familia politiko, ankaŭ al interesojn de katolikoj”. La parlamentanoj asertis, ke la manifestacio fariĝos tircentro de patriota junularo kaj de aliaj aktivaj civitanoj” kaj tiam povas komenciĝi tumulto. La Ĝenerala Prokuroraro tiam rifuzis kontentigi la alvokon.

Publika opinio ne kongruis kun tiu de la Prokuroraro. El pridemando de litova loĝantaro sekvis, ke eĉ 73,3 % malaprobis la porgejan permeson, ne kontraŭis okazigon de la manifestacio nur 10,2 % , ne havas pozicion pri ĉi problemo 16,6 % de la loĝantaro. Tamen, estas atentinde, ke 70 % de litova loĝantaro opinias, ke gejoj ne devas esti diskriminataj pri laboro, 37 % konsentis loĝi apud ili. Kiam populara televido LNK okazigis diskuton permesi aŭ malpermesi la demonstradon, la pagata telefona voĉdonado ukulfrape kontraŭis la demonstradon.”Kontraŭ” estis 11420 voĉoj, “por” apenaŭ mil. Pli ol dek mil vilnanoj subskribis jenan deklaron:

“Ni, subskribintoj, estas indigniĝintaj pro la permeso, kiun donis Vilna urbestro Vilius Navickas por aranĝo de geja kaj lesba manifestacio la 8-an de majo laŭ Vilnaj stratoj. Ni ne batalas kontraŭ homoj de alia orientiĝo, sed elpaŝas kategorie kontraŭ malestimo al familiaj valoroj kaj fiaskigo de nacia moralo. La gejan manifestadon ni taksas kiel kontraŭanta al kristanaj valoroj, kiel propogandon de homoseksualismo, neakceptebla por la socio”.



Aŭtoritata pastro monsinjoro Alfonsas Svarinskas tralegis alvokon al patriotoj de Litovio “SOS-voko” en kiu li atentigis, ke la Eklezio homoseksualajn seksrilatojn konsideras granda degeneriĝo kaj indigniĝis, ke ŝtatpotenco malgraŭ miloj da subskriboj kontraŭ la manifestado, dece ne reagis. Ja, laŭ deklaro de Litova partio de kristana demokratio “Homoseksualeco estas agresiva ideologio celanta neniigi kristanecon, degeneriigi popolojn, tiel fine likvidi naciajn ŝtatojn ... Iu tutmonda krima organizaĵo venas al Litovio kaj deziras detrui ĉion kio estas valora por Litovio”.

Post tiam, kiam ĉefprokuroro ekŝiĝis, la situacio ŝanĝiĝis. La provizora ĉefprokuroro Raimondas Petrauskas, argumentante, ke laŭ liaj informoj la manifestacio povas provoki tumulton, sinturnis al Juĝejo de la unua instanco kun propono nuligi la permeson por la manifestacio. Juĝistaro nuligis la permeson. LGL plendis al Supera Administra Juĝejo kaj al Litova Prezidanto. Finfine, antaŭtage, post trihora traktado la Supera Administra Juĝejo nuligis la nean decidon de la Primara Juĝejo.

Gastanta en Litovio Birgitta Ohlsson, sveda ministrino pri aferoj de Eŭropa Unio, la decidon nomis grava paŝo en la homrajta sfero. Ŝi diris: “Mi, sendube, marŝos dum la parado por subteni la homajn rajtojn ... Mi plene konfidis al Litova polico, ke ĝi sekurigos ĉiujn nin, kiuj parados”. Poliestro K. Lanĉinskas certigis, ke la polico ne permesos kolizii al du konfliktantaj flankoj, ke ĝi traserĉos, ĉu la spektantoj malhavas bastonojn, brullikvaĵojn, ovojn, tomatojn kaj ceterajn danĝerajn objektojn.

Por paradi registriĝis 250 homoj el tuta Eŭropo - el Svedio, Finnlando, Nederlando, Svislando, Turkio, Norvegio, Pollando kaj Nederlando (kompreneble, el la ĉefurbo de gejecko) ktp. Al Vilno venis eĉ 70 aktivuloj de la organizaĵo “Amnesty internacional”. Entute por paradi kolektiĝis pli ol 300 demonstrantoj. Ilin gardis pli ol 500 policianoj (inter ili 8 rajdantoj, kelkaj kinologoj kun ŝafhundoj, iuj policianoj estis kun gasmaskoj). Super la demonstrantoj kaj ĉirkaŭ mil kvincent observantoj flugadis helikoptero. Surtratuare estis starigitaj metalaj bariloj al kiuj ĉe la fino de la demonstracio la polico pretis ŝalti ŝokelektron.

Kaj jen, la demonstrantoj disfaldis grandan, ĉirkaŭ 20 metrojn longan ĉielarkan standardon kaj ekiris. Sonas la angla lingvo kaj tamburado. Oni portas afiŝtabulojn kun surskriboj por defendo de iliaj rajtoj, ankaŭ naciajn standardojn de Israelo, Latvio, Skotlando... Siajn sentojn oni esprimas per francaj langokisoj, sen demonstri intimajn pozojn (ili estas ja ne en Amsterdamo). Alfrontis afiŝtabulo “Por manifestacio de gejoj kaj lesboj – ne!” Obstine sonsignalis stiristoj. Iuj ofende kriis: “Por geja diktaturo – ne!”, “Piderai, piderai!” (pederastoj, pederastoj). Iuj protestintoj asertis, ke ili estas nur kontraŭ propogando de homoseksualeco, ne kontraŭ gejoj speciale. Iu mezaĝa virino indigniĝis: “Se ni permesas demonstracii al gejoj, ni baldaŭ devos toleri ankaŭ pedofilojn. Ili strebas, ke ilian partnerecon oni traktu familio kun rajto adopti infanojn kaj eduki ilin kiel novajn gejojn kaj lesbojn”. Ekspolitikisto V. Ŝustauskas laŭte klarigis: “Naturan degeneron havas eble nur unu procento, ceteraj iĝas pederastoj pro tro bona vivo. Rara patrino naskas gejon.” Iu superŝutas la ekspolitikiston per akvo. La homamaso forbruligas ĉielarkan standardon. Estis arestitaj 19 protestintoj. Jen en tia atmosfero pasis la parado “Por toleremo”.



V. Simonko

Veninta el Pollando iu Brzegosz Czarnecki rakontis poste: “Estas al ni tre grave esti ĉi tie kaj subteni litovajn gejojn. Antaŭe ankaŭ en Pollando estis simila situacio. La ŝtatpotenco dufoje malpermesis paradojn kaj la aranĝo en Krakovo elvokis similan agreson kiel nun en Vilno. La situacio ŝanĝigis - jam dum dek jaroj en Pollando okazas demonstracioj. Mi esperas, ke dum jaroj dek la situacio ŝanĝiĝos ankaŭ en Litovio”.



Post la demonstrado la prezidanto de LGL V. Simonko diris al ĵurnalistoj: “Mi vere tre ĝojas. Finfine en Litovio oni estimas niajn rajtojn. Mi deziras danki al la estimata urbestro, al polico pro vere bone plenumita laboro”. V. Simonko informis, ke sekva geja manifestacio en Vilno okazos (certe, pli impona) en la jaro 2013.



La sekurecigo de demonstrintoj al krizotoleranta Litovio kostis 180 mil Lidojn (52 mil €). Ĉi-lige ĵurnalista de *Alfa.lt* interesiĝis pri kiomaj financoj disponas LGL, kiu havas eble ĉirkaŭ mil membrojn. La prezidanto V. Simonko rifuzis respondi ĉi tiun demandon: “Kial mi devas diri kioman financadon ni ricevis? Mi ja ne demandas kiom perlaboris vi!”. Sole, kion “elfosis” *Alfa.lt* : LGL pasintjare ricevis pli ol 1,5 milionan (en Lidoj) subtenon laŭ programo de EU, ĉirkaŭ 330 mil Ld. de Norvegia “Norway grants”. Litova financa ministerio ĉi-jare jam prezentis al LGL 345 mil Ld “por la evoluo de la agado”.



La historio pri la paradaj eventoj ankoraŭ ne finiĝis. La polico prezentis porjuĝan plendon kontraŭ la parlamentanoj P. Gražulis kaj K. Uoka, kiuj tuj post oficiala finiĝo de la paradado senpermesite transiris la feran barilon kaj tiel “rompis la publikan ordon”. Litovio estis la lasta lando Eŭropa, kiu ne tre dezirante akceptis kristanecon. Ĝi estas la lasta (ĉu?) Eŭropa lando, kiu tre nedezirante, sub eksterlanda premeĝo, enlasas gejecon ...



Estas uzitaj interretaj fotoj de I.Geliūnas,  
J.Jurkūnas, A.Vaitkevičius kaj de ELTA

V. Miklašėnas

## Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

EL "Enkonduko"

La Akademio de Esperanto prezentas en tiu ĉi *Naŭa Oficiala Aldono* 209 radikojn, kiujn ĝi decidis oficialigi.

Kiam la Akademio oficialigas radikon, tio formale signifas, ke ĝi aldonas tiun radikon al la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento de Esperanto. Tio tamen ne signifas, ke la radiko fariĝas Fundamenta, ĉar Fundamentaj estas nur tiuj elementoj, kiuj troviĝas en la origina netuŝebla Fundamento. Praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo. Devige gvidi la lingvouzon la Akademio nek povas, nek volas, sed ĝi esperas, ke ĝiajn rekomendojn la uzantoj de la lingvo atentos kaj trovos utilaj. Ĉe verboj la transitivecon (kaj ĝenerale la frazokonstruadon) ni montras nur per ekzemploj.

*Al la legantoj de LS, kiel ekzemplon, ni prezentas kelkajn esplikojn de oficialigitaj vortoj. Por konatiĝi kun la plena Naŭa Oficiala aldono al la Universala vortaro de Esperanto iru al: <http://akademio-de-esperanto.org/decidoj/9oa.html>*

**aidos/o.** Akirita malsufiĉo de la imunsistemo. Grava malsano, kiu malfortigas la korpajn defendojn kontraŭ ĉiaj malsanoj, plej ofte transdonata per seksaj kontaktoj aŭ infektita sango.

**Antarkt/o.** La regiono kaj kontinento ĉirkaŭ la suda poluso. **Antarkt/a.** Rilata al Antarkto; tia kiel (en) Antarkto: *la Antarkta Cirklo; Antarkta klimato; Antarkta glacio.*

**Arkt/o.** La regiono ĉirkaŭ la norda poluso. **Arkt/a.** Rilata al Arktto; tia kiel (en) Arktto: *la Arkta Oceano; la Arkta Cirklo; Arkta klimato.*

**modem/o.** Aparato, kiu transformas ciferecan signalon (ekz. de komputilo) en analogan aŭ inverse, por transsendo per telefona reto, radio, elektra reto aŭ simile: *konekti komputilon al la Interreto per modemo.*

**pic/o.** Italdevena manĝaĵo el platigita (ronda) pastopeco kun surmetitaj tomatoj, fromaĝo kaj aliaj ingrediencoj, bakata en forno: *pico kun anĉovoj; pico kun ŝinko; funga pico; kvarsezona pico.* **pic/ej/o.** Restoracio aŭ simila ejo, kiu ĉefe vendas picojn.

**vand/o.** Interna, maldika muro aŭ alispeca apartigaĵo dividanta iun spacon: *vando de ĉelo; vando de ĉambro; vando de vagono.*

*Litova popola kanto*

Tradukis – V.Ŝilas

**VENOS MI**

(ateisiu, mergužele, ateisiu)

*Modere lante*

1. Ven - os mi, fraŭ - li - ne - to, ve - nos  
mi. Ven - os mi, post sub - i - ro de la  
sun`. Vi a - ten - du mi - an ve - non en la  
ru - ta flor - ĝar - de - no. Ve - nos mi, post sub -  
i - ro de la sun`.

2. Ĝis la ven` amokanton kantu vi.  
Ĝis la ven` florkolektu en ĝarden`.  
Por ke nokto vin ne tedu kaj soleco ne obsedu,  
Ĝis la ven` amokanton kantu vi.
3. Kanton ĉi antaŭ longe scias mi.  
Ofte mi ĝuis de la melodi`.  
Ekde nun ni kantu kune tra la nokto hela lune.  
Belas nun – lante malaperas sun`.
4. Sole ni sciu pri la nokto ĉi.  
Sole ni sciu pri la nokto ĉi,  
Kiel fine ĉesis kantoj kaj ekdormis geamantoj.  
Belas nun – ĉe l` aŭror` vekiĝas sun`.

## ESPERANTO – MOZAIKO

☆ **Por renkontiĝi kun francoj venu al Havano.** Laŭ informo de [www.uea.org](http://www.uea.org) al la UK-2010 en Havano al la 25-a de majo jam aliĝis 920 personoj el 59 landoj. Distingiĝas Francio kun 109, Japanio kun 75, Germanio kun 68, Brazilo kun 64 kongresontoj. El Kubo mem aliĝis 155 personoj. El Litovio – 15.

☆ Ĉe la retejo de Amerika komisiono de UEA aŭskultebblas mp3-arĥivoj de ĉiudimanĉaj elsendoj de E-programo de **Radio Habana Cuba**. La aŭskultantoj estas informataj ne nur pri Kubaj sociaj, kulturaj kaj politikaj okazintaĵoj, sed ankaŭ pri E-aktualaĵoj. Cetere, dum la kongresa semajno la elsendoj estos ĉiutagaj! Redaktorino de la programo estas Maritza Gutiérrez. Iru al: <http://www.ameriko.org/radiokubo>

Membro de la **ekzamena komisiono ĉe UEA Renato Corsetti** reprezentis UEA en la 38-a Kunveno kaj Konferenca Tago de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) en Romo la 14-an de majo. La konferenco temis pri la priskribo de la konoj bezonataj por atingi la nivelojn A1, A2, ktp. de la Eŭropa Referenckadro, laŭ kiu ankaŭ UEA organizas oficialajn ekzamenojn kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. Dum la tago estis faritaj pluraj kontaktoj kun aliaj delegitoj kaj tute aparte kun la

partoprenintaj reprezentantoj de la Itala Ministerio pri Instruado.

☆ Ĉina profesoro **Liang Ziming** informas: En la urbo Ho Chi Minh, ni vizitis du grandajn firmaojn \*TTC Express\* havanta 1400 laborantojn en la tuta lando, \*Tojo\* produktanta kaj eksportanta manĝaĵojn. Estroj de ambaŭ grandaj firmaoj konsentis uzi Esperanton en komerca agado. Konkrete estas, ke ili presos uzotajn klarigojn sur ĉiuj pakaĵoj de la varoj nur en Esperanto, en la vjetnama kaj en la ĉina, sed \*ne en la angla\* inter nia komerca kunlaboro; [lzm135@126.com](mailto:lzm135@126.com)

### ⌘ KORESPONDA KESTO ⌘

Hispana esperantisto deziras korespondi kun gelitovoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.  
La adreso estas:



ALEJANDRO CERVERA  
c/ Ramon y Cajal – 4- Bajo  
46960 – ALDAYA – VALENCIA  
HISPANIO-ESPANA

☆

*En viaj korespond-petoj bv. vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn.*

*Kune kun via korespond-peto ne forgesu sendi al [litovastelo@takas.lt](mailto:litovastelo@takas.lt) ankaŭ vian foton, kiun ni publikigos kune kun via anonco!*



# RIDETU KUNE!



## ☺ SOMERUMO

Unuj somerumas somere, aliaj tie,  
kie estas somero. Ceteraj – hejme.

## ☺ EKVILIBRO

- Kiu estas trankvila kaj ekvilibrigita eŭropa familio?
- Tiu, en kiu la edzo ricevas salajron en usonaj dolaroj, la edzino en Eŭroj kaj la infanoj ankoraŭ ne admonas monon.

## ☺ ORDINARA VIVO

- Kio estas krizo? Ĉu la tempo, kiam forestas mono?
- Ne, krizo estas tiam, kiam la mono estis. Sed kiam la mono mankas – estas ordinara vivo.

## ☺ EN REALO

- Kiel oni reagis, kiam la botelo da vino estas jam duonplena?
- Pesimisto: restis nur duono da botelo!
- Optimisto: restis ankoraŭ duono da botelo!
- Realisto kuras en apudan vendejon por akiri plian botelon da vino.

## ☺ SERVICE

- Ĉu estas facile esti edzo de juna, bela, arda kaj alloga virino? Ĉu vi imagas, kiom da viroj viciĝas ĉe la pordo de via loĝejo, kiam vi por longe forveturas?
- Mi pri tio scias, sed kion mi faru?
- Eksedziĝu!
- Kaj poste? Ĉu ankaŭ mi staru en la vico?

## ☺ NE BATU

- La edzo kaptis amindulon de sia edzino kaj komencis lin bategi.
- La edzino senespere:
- Ĉesu! Restigu lin! Li ja estas patro de viaj infanoj!

---

PERANTOJ *de* LITOVA STELO

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN  
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadejdinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF BRITIO: Viv O` Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE  
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II  
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø  
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE  
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS  
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstrasse 9, DE-10551 BERLIN  
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL  
 ITALIO: Višnja Brankovič, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875  
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, [ruta64@centras.lt](mailto:ruta64@centras.lt); tel. +353 8762 78929  
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecibas 35-13, RĪGA LV-1045  
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP  
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM  
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, [lodzano@nestrada.pl](mailto:lodzano@nestrada.pl)  
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD  
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 –35 HÖRBY  
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;  
[ml@esper.kiev.ua](mailto:ml@esper.kiev.ua)  
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

*PERANTOJ EN ALIAJ LANDOJ ESTAS SERĈATAJ!*

La revuon *Litova Stelo* vi povas aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la administracio de Litova E-Asocio (LEA, ab. D. 167, LT-44002 Kaunas-C; [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)).

Se vi ĝiros la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem nepre informu la administracion de LEA (ne la redaktoron) kaj sendu al ĝi via(j)n adres(o)jn.

**ATENTU LA ABONPREZOJN ! Ili ne altiĝis !!**

Por Litovio: jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt; malnova jarkolekto 10 Lt.  
 Por landoj de eksa Sovetio: jarabono 7 €;  
     unuopa n-ro 1,50 €; malnova jarkolekto 4 €.  
 Por eksaj socialismaj landoj: jarabono 10 €; unuopa n-ro 2 €;  
     malnova jarkolekto 5 €.  
 Por ceteraj landoj: jarabono 14 €; aĉerpoŝta aldono 6 €;  
     unuopa n-ro 3 €; malnova jarkolekto 7 €.

*Pro falanta kurzo de USD ni indikas abonprezojn nur en EUROj.*

***La abonado senlimdata! - ĉiu aboninto ricevos ses numerojn de la jaro!***

---

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas  
 2010 m. Nr.3. Baigta redaguoti 2010.06.01.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...

Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas-31